

11-a KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

DURĐEVAC
30-a junio - 2-a julio 2023

Organizantoj:
*Kroata Esperanto-Ligo, Zagreb kaj
Dokumenta Esperanto-Centro, Đurđevac*

Konstanta adreso de la kongreso:
Dokumenta Esperanto-Centro
Bana Jelačića 138a, HR-48350 Đurđevac
dec.kroatio@gmail.com

Konto por kongresaj pagoj:
Dokumentacijski esperantski centar
HR0723400091111000952

ALIĜILO

KONGRESA NUMERO	
--------------------	--

FAMILIA NOMO _____

PERSONA NOMO _____

Poŝtkodo kaj urbo _____

Strato kaj domnumero _____

Naskiĝdato _____

Telefono / Poŝtelefono _____

Retadreso _____

**Per subskribo de la aliĝilo mi permesas publikigon de mia nomo kaj devenlando
en la reta listo de aliĝintoj kaj en la Kongresa libro.**

Kategorio (rondsignu la kategorion en kiu vi aliĝas)		Ĝis la 28-a de februaro 2023	Ĝis la 30-a de aprilo 2023	Post la 30-a de aprilo 2023
1.	Plenkreskulo	20,00 eŭroj	25,00 eŭroj	30,00 eŭroj
2.	Kunulo	15,00 eŭroj	20,00 eŭroj	25,00 eŭroj
3.	Junulo	15,00 eŭroj	20,00 eŭroj	25,00 eŭroj
4.	Handikapulo	10,00 eŭroj	12,50 eŭroj	15,00 eŭroj
5.	Akompananto de handikapulo	0,00 eŭroj	0,00 eŭroj	0,00 eŭroj

DATO

SUBSKRIBO

KLARIGOJ

Kunulo estas kongresano kiu loĝas samadrese kun alia kongresano paganta plenan kongreskotizon.

Junulo estas ĉiu kongresano kiu en la datoj kiam okazas la kongreso estas malpli ol 25-jara.

Handikapulo estas ĉiu kongresano kiu havas medicine pruveblan handikapon.

Akompananto de handikapulo estas persono sen kies akompano handikapa kongresano ne povus partopreni la kongreson (rulseĝulo, vidhandikapulo ktp).

La kotizo ne estas repagebla, sed estas transdonebla al alia persono kun adapto de kategorio.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon kaj manĝojn. Por mendi loĝadon vi ricevos apartan mendilon.

La kotizo inkluzivas nenian asekuron, pri kio kongresanoj mem zorgu.

KONFIRMILO, MENDILOJ, NOMŜILDO

Ĉiu kongresano post pagita kongreskotizo ricevos respektivan konfirmilon kaj mendilon por loĝado, pikniko kaj kongresa ekskurso. En la kongresejo ĉiu kongresano ricevos nomŝildon kaj kongresajn materialojn. Kongresanoj bonvolu ĉiam porti la kongresan nomŝildon, kiu pravas ilian kongresanecon.

LOĜADO

Loĝado estos organizita en la **Ĉasista domo „Peski”** (*Mihovila Pavleka Miškine 30*), kiu troviĝas iom ekster la urbocentro, en bela kaj kvietaj arbara regiono. Ĝi taŭgas por kongresanoj kiuj venos per propraj aŭtomobiloj. La ĉambroj estas dulitaj, do bonvolu jam anticipe interkonsenti kun kiu vi volas loĝi. Alia loĝebleco estas la 4-stela **Hotelo „Picok”** en la strikta urbocentro, promendistance de la kongresejo. Ĝi taŭgas por personoj kiuj bezonas pli altnivelan komforton. La tria ebleco estas **privataj tranoktejoj** en diversaj partoj de la urbo, kiuj posedas malsaman komforton kaj atingebblas nur aŭtomobile. Eblas organizi loĝadon ankaŭ en la **Hostelo „Borik”**, troviĝanta en la protektita arbaro rande de la urbo, tamen promendistance al la urbocentro. Tiu kategorio taŭgas por gejunuloj, ĉar oni loĝas en grandaj multlitaj viraj kaj virinaj ĉambroj.

Rezervi la loĝadon eblas nur post pagita kongreskotizo kaj samtempa pagado de loĝkostoj. La loĝadon bonvolu mendi laste ĝis la fino de la dua aliĝperiodo (30-a de aprilo 2023).

PAGOJ

Ĉiujn pagojn faru al la bankkonto de Dokumenta Esperanto-Centro ĉe Privredna banka Zagreb:

HR0723400091111000952

INFORMADO

Ĉiujn prikongresajn informojn bonvolu legi en la retejo de Dokumenta Esperanto-Centro:

<https://novo.dec-kroatio.hr>

KONGRESA PROGRAMO

Ankoraŭ preparata. Se vi volas kontribui per iu programero, nepre informu pri tio la organizanton (dec.kroatio@gmail.com) por pritrakti vian ideon.

KONGRESA EKSKURSO KAJ PIKNIKO

Pikniko okazos sabate, la 1-an de julio 2023 posttagmeze ĉe Dokumenta Esperanto-Centro. Ĝi inkluzivos tagmanĝon kaj trinkaĵojn, kaj estos senpaga por ĉiuj aliĝintoj.

Kongresa ekskurso okazos dimanĉe, la 2-an de julio 2023 kaj gvidos nin tra la regiono de Podravino. Estos inkluzivita ankaŭ dumekskursa tagmanĝon, sed detaloj pri vizitotaj lokoj kaj prezo ankoraŭ ne estas konataj.

Kontakto kun la organizantoj:
dec.kroatio@gmail.com